

PASTRO SERIŠEV

# SIBERIO



- 1914 -

ELDONAJO DE LA CENTRA KOMERCA OFICEJO

Prezjo D. HALLET, Charleroi, Belgijo

PASTRO I. SERIŜEV

---

# SIBERIO

VOLUMARO


DE ORIGINALAJ KAJ TRADUKITAJ VERKAĴOJ

I<sup>a</sup> VOLUMO

## TRANSBAJKALO

UNUA PARTO

---

  
BELGA ESPERANTO-INSTITUTO  
(Koopera Societo)  
Kleine Hondstraat, 11, rue du Petit Chien  
(Belgujo) ANTVERPENO

## ANTAŬPAROLO DE LA UNUA VOLUMO

En la unua volumo oni trovos pli multe da tradukaĵoj ol da originalaĵoj, sed en la duan volumon mi esperas enmeti pli multe da originalaj artikoloj, ĉar mi ricevis de kelkaj el miaj amikoj promesojn verki ruslingve artikolojn kaj rakontojn speciale por mia eldonaĵo.

Mi devas averti la estimatan gelegantaron ke mi tute ne opinias ke la enhavo de la unua kaj dua volumoj konatigos la esperantistaron kun Transbajkalo. Tiu temo estas tro ampleksa kaj preskaŭ neelĉerpebla ; sed mi sincere esperas ke la tutmonda geamikaro trovos tie facilajn legaĵojn, kiuj iomete helpas al ili por konatiĝi kun la Siberiaj popoloj, kun ilia intima vivo, iliaj tipoj, iliaj moroj, kio ordinare forglitas de la okuloj eĉ al spertaj fremdaj esploristoj.

Efektive la aŭtoroj de ĉiuj artikoloj de mia eldonaĵo estas ne fremduloj, sed aborigenoj de Siberio, kiuj sufiĉe konas sian popolon kaj la vivmanieron en sia regiono.

Oni ne miru ke la artikoloj de la unua volumo plejmulte koncernas la vilaĝan vivadon : unue, mi esperas ankaŭ pritrakti la urban vivadon en aliaj volumoj ; due, la vilaĝa vivo estas pli interesa, pli speciala kaj pli malbone konata ol la urba.

Kiu deziras konatiĝi kun Siberio, tiu devas antaŭe konatiĝi kun la Siberia vilaĝo por vidi la fundamenton de Siberio : ĝian popolon.

\*  
\* \*

En la dua volumo oni tralegos detalojn pri la fama antaŭurbeto Kjahta kaj urbo Troickosavsk, kaj ankaŭ pri la Hin-Mongola urbeto Majmaĉen.

La duono de la presmaterialo por la dua volumo jam estas tute preta, kaj ĝi aperos baldaŭ post la presado de la unua.

Mi petas miajn samideanojn sincere skribi al mi pri ĉiuj malkomprenaĵoj kaj klarigindaĵoj kiujn ili estos trovintaj en mia unua volumo, kaj ankaŭ pri la ĝenerala impreso kiun donis ĝia tralegado. Ili sendu siajn esprimdezirojn, konsilojn, proponojn ; mi ricevos ilin dankeme.

La ekskluzivan rajton traduki franclingven mian unuan volumon (aŭ ĝiajn partojn) mi transdonas al la eldonisto Sro D. Hallet, en Charleroy (Belgiujo).

Tiu, kiu deziras traduki mian volumon en ian alian lingvon, bonvolu peti mian permeson.

Siberio, volumaro de originalaj kaj tradukitaj verkaĵoj,  
de l'astro J. SERIŠEV. 1<sup>o</sup> volumo : « Transbaikalo », unua parto,  
eldonita de la **Centra Komercia Oficejo**, D. Hallet, rue des  
Boucheurs, 13, Charleroi. 248 paĝoj, 24 x 2 x 16 x 2 cm. Prezo :  
Fr. 3. — Sm. 1.00.

El Belga Esperantisto 069 1914